

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1976



20. Jarkunveno de GEFA en Paderborn



Prezidanto Gießner trondonas donacon al la urbestro, s-ro Herbert Schwiete, kiu honoroficas por la urbo, sed profesie estras lernejon, en kiu infanoj el 6 klasoj lernas Esperanton.

Plaŭdoj kaj aplaŭdoj

Informoj kaj marĝenaj notoj pri la 20a Jarkunveno de GEFA en Paderborn.

Ne hazarde GEFA elektis Paderborn kiel lokon de sia nunjara ĉefkunveno. Kie de jarmiloj plaŭdas pli ol 200 Pader-fontoj kaj ĉiun sekundon elterigas kelkajn mil litrojn da akvo, tie antaŭ pluraj jaroj ankaŭ la Verda Lakto, kiel Andreo Cseh nomis tian fenomenon, esperige komencis guti. Ankorau ne torenta fluo, sed jam konsiderinda rivereto de multaj aktivecoj esperantlingvaj kaj esperantistaj sur organizaj kaj sciencaj terenoj efikas fekundige al plej diversaj sociaj kampoj. Iam konata ĉefe kiel konservative katolika centro, Paderborn fariĝis pilgrimejo pri diversbranĉaj Esperanto-institucioj. Loga celo ĝi ŝajnis esti ankaŭ al 134 GEFA-anoj por pasigi la semajnfinojn 15. – 17. de Oktobro en la historie atentinda episkopa urbo. Dum la sabata festprogramo ni nombris eĉ pli ol 340 aktivulojn kaj gastojn. Kiu retrospektive, kaj certe ne malprave, opinias nian 20-an Jarkunvenon impona manifestacio, rajtas ankaŭ demandi sin pri la efikeco de tia demonstrado, pri ĝia impreso al tiu publiko, kiun ni ja volas atingi. Ĉu ni solenis festivalon por ni mem aŭ ĉu ni sukcesis tamburi inter la kolegaro, tion certe montris la baldaŭa estonto. El tiu vidpunkto la elekto de Paderborn sendube estis bona solvo; kvankam ne jam ekzistas tie fervojista esperantisto, tamen la aspektoj estas promesaj. Direktoro Arnecke, ĉefo de la tiea fervoja riparejo, certigis sian helpopreton. Kaj la fidindan kunlaboron de la loka grupo, reprezentita de s-ino Lawerino kaj d-ro Kasselmann la kunvenintoj spertis de la akcepto ĝis la adiaŭo. Agrabla tradicio estiĝis la vendreda kunveno en babila rondo, pri kio oni dum niaj cetera ĉiam abundaj programoj apenaŭ trovas neokupitan horeton. La ĉeestantoj havis krome la ŝancon, travivite tute aktuale la Universalan Kongreson en Athen, per sonfilmo de W. Barnickel. La frue komencita kunveno de estraro kun komisiitoj povis tamen ne trakti ĉiujn gravajn problemojn. Sinjoro Bayerath, kompetenta pri kulturaj aferoj en la BSW-estraro, ĉeestis parton de la labor-kunsido. Responde al demandoj de la komisiitoj, kiuj ne komprenis la rigoran limigon de subvencioj, ĉar samtempe la kotizoj pagitaj de la membraro restis

neŝanĝitaj, li provis klarigi la financon situation de BSW. Nespertulo devus esti kompreninta, ke por administri malpli da mono oni bezonas pli da oficistaro. La sole klara konsekvenco estis por GEFA, plialtigi la jarkotizon, se ni plue volas legi nian Bultenon, eldoni proprajn varbilojn kaj plenumi la multajn taskojn, kiujn ni opinias gravaj.

Dum la samaj horoj okazis du paralelaj programoj. Fremduloj profitis la gvidadon tra la urbcentro kun konstruaĵoj, ruinoj kaj elfosaĵoj el ĉiuj stilepokoj konataj sur germana tereno, kaj serĉis la misteron de la 200 fontoj, parte eĉ varmaj, kiuj motivigis la pratempan koloniadon ĉi tie. Alia grupo havis okazon, en la FEoLL-instituto de profesoro Frank, inspekti la esploradon kaj evoluigon de modernaj instru- kaj lernmetodoj. Subĉiela koncerto de la fervojista blovorkestro Paderborn sub gvido de profesoro Ptacnik, kaj la agrable varma antaŭtagmeza sunbrilo tiris multajn civitanojn al la urbdomo, en kiu dume la urbestro akceptis la delegitojn. Ankaŭ posttagmeze la suno favoris la ekskursantojn kaj bele kolorigis la aŭtunan pejzaĝon. La rokogrupo Externsteine estis ĝermana kultejo, kiun en la 12a jarcento kristana ordeno ŝanĝis por siaj bezonoj; tion atestas unika reliefo en roka muro. Dua vizito kondukis al rimarkinde malsama vidindaĵo: la bronza Hermann, giganta simbolo de heroisma epoko pasinta kun la germana imperiestra regno.

En la abunda vespera programo speciale plaĉis la kultura nivelo kaj la manko de ofte kritikita longa vortumado. Post saluto de prezidanto Gießner sole la gastiganto, reprezentita de s-ro Rischke el la BSW-distriktestraro Essen, parolis al la kunvenintoj. Li speciale rimarkigis la bonan kunlaboron inter diversaj kultur-grupoj kaj instancoj por sukcesigi tiun ĉi jarkunvenon. „En la komenco estis la vorto“ li citis laŭ Johano, tiel emfazante la neprecon de interkomunikado per parolo kaj skribo trans ĉiajn limojn. Varia koncerto de ĥoro, orkestro kaj solistoj ĝojigis okulojn kaj orelojn per prezentoj de Mozart, Verdi, Schubert, Donizetti kaj Nicolai. Admirinda akordiĝo inter la gekantistoj Anni Wiesmann (soprano), Alfons Hoffmann (tenoro),

Walter Lange (baso) kaj la plane akompananta Elisabeth Ritterspach kulminis en la terceto Sarastro-Pamina-Tamino el la Sorĉa Fluto de W. A. Mozart. El la ĥorkantoj, prezentitaj de la fervojista ĥoro Tandaradei, evidente plej plaĉis la nostalgia kanto de la hebreaĵ sklavoj el Nabucco de G. Verdi.

La gastoj, inter kiuj troviĝis reprezentantoj de sindikatoj kaj fervojo, staciestro, uzindirektoro, ĉefo de varstacio kaj fervoja kuracisto, diligente uzis la eblon sekvi la kantotekstojn laŭ la perfekte adaptita traduko de J. Gießner. Eble GEFA trovas iam okazon, eldoni la kompletan kolekton de ĝis nun aperintaj verkoj, ĉar bonaj kantotradukaĵoj vaste mankas ankoraŭ.

Kadruma koncertmuziko de la BSW-orkestro Essen kaj granda aplaŭdo finis la solenan parton de la vespero. Kun gajaj homoj en festaj vestoj vigle dancantaj laŭ moderaj ne tro modernaj ritmoj, kun amuza tombolo kaj tro multaj premioj, kun viveca babilado kaj ŝercado inter malnovaj geamikoj rapide pasis la lastaj horoj de sabato kaj la unuaj dimanĉaj.

Seriozajn vortojn pri haltigo de la stagnado parolis GEFA-prezidanto Gießner malferminte la dimanĉan matenprogramon. Ke stagno aŭ eĉ regreso ne estas nepra konsekvenco el nunaj sociaj cirkonstancoj, tion li demonstris per konvinkaj ekzemploj. Pli ol iam antaŭe oni bezonus la Internacian Lingvon; ĉu ni do ne trafas la ĝustan manieron proponi ĝin, ĉu mankas

oferemo, diligento, kapablaj kunlaborantoj? Ĉi-okaze ni memorigas pri nia nova kvarpaĝa (A5) varbfolio, kiun ĉiu intereso povas postuli de sia distriktkomisiito.

Sinjoro Marquardt, gvidanto de la kleriga fako en la sindikato GdED, kiu partoprenis jam la antaŭan tagon, salutis por la ĉefestraro kaj esprimis sian simpaton, kiun li montris per konkretaj proponoj pri kunlaboro en la klerigado de la fervoja personaro. Por la sindikato GDBA ĉeestis s-roj Schwarte kaj Top, kiu lasta salutis en la nomo de sia ĉefestraro kaj certigis pluan subtenon ankaŭ de tiu flanko. Kolego de Jong parolis varmajn dankvortojn pri la duobla prezidanteco de J. Gießner, kiu investas krome ankoraŭ multe da tempo en aliaj esperantistaj aktivecoj. La najbaran belgan asocion reprezentis ties prezidanto De Sutter. Vicprezidanto v. Leeuwen salutis por nia internacia federacio. Sinjoro Hirsch parolis por Germana Esperanto-Asocio. Apartan intereson vekis la demonstrado de la Robbimat-lernmaŝino, kiun klarigis Hermann Behrmann, raportante pri la multflankaj pri- kaj per-esperantaj agadoj en Paderborn.

Kun ĉarmo kaj fervoro infana dancgrupo montris latin-amerikajn dancojn kaj la francan Ĉan-Ĉan. Lertaj fingroj de kapablaj junulinoj ludis nefacilajn akordionmelodiojn. GEFA-prezidanto fermis tagmeze la jarkunvenon invitante al la venonta en Saarbrücken.

wbr

J a r r a p o r t o

pri la periodo de la 19a ĝis la 20a jarkunvenoj

Antaŭrimarkigo: Studante la raporton, bv kompari la pasintjarajn.

El niaj membroj mortis

| | |
|-------------------------|-----------|
| Wilhelm Pagelsdorf (75) | 1.10. 75 |
| Kurt Jentsch (68) | 6.10. 75 |
| Otto H. Winkelhaus (72) | Nov. 75 |
| Adolf Simon (76) | 11.11. 75 |
| Willi Rothmann | 21. 4. 76 |
| Adolf Stümpfig | 30. 5. 76 |
| Alfred Dawid | 18. 7. 76 |

Ni ne forgesos ilin.

Organizaj aferoj

Por 1976 GEFA kotizis al IFEF por 846 membroj (individuaj kaj korporaciaj). La jarkotizo tute subite kaj sen antaŭa

preparolado kun la distriktkomisiitoj devis esti plialtigita de 6 al 9 gmk. Kaŭzis tion la same surpriza (en Februaro) sciigo de BSW, ke la disponeblaj rimedoj denove estos reduktataj, tiel ke eĉ la kosto por „Bulteno“ ne plu estas kovrataj. Tamen ankaŭ tiu nova kotizo restas konsiderinde sub la kutima nivelo de „klubkotizoj“.

La **laborkonsilantaro** kunvenis dufoje kun la distriktkomisiitoj (Treuchtlingen kaj Frankfurt), krome en Decembro en Lippstadt.

Personaraj ŝanĝoj

Notinde estas, ke intertempe

la reduktado de la direktoj de 16 al 10 finiĝis. Kiel lasta malaperis Regensburg (antaŭe jam Augsburg, Kassel, Mainz, Münster kaj Wuppertal). Sekve ankaŭ ties distriktestro Vitus Röder perdis sian oficon. Aliaj ŝanĝoj ne okazis.

Kursoj

En 1975 komenciĝis 7 kursoj kun 45 partoprenintoj (pasintjare 8 kun 22 partoprenintoj). Sekve la ĉi-rilata situacio laŭ nombro de personoj iom pliboniĝis. Tamen ni nepre priatentu denove la respektivajn vortojn de la pasintjara jarraporto, paĝo 1, malsupre! Multaj kursoj necesas, sed same la kursestroj zorgu poste pri la novuloj. Ili sentu sin hejme en niaj rondoj.

Ekzamenkomisiono sub gvidado de F. Lautenbach kun pozitivaj rezultoj ekzamenis en la 19a jarkunveno 4 partoprenantojn [kol. Krüger (Stuttgart), Müller (Saarbrücken) kaj Rösemann (Hannover), krome s-ano Maier (neferovojisto)].

Kunlaboro en IFEF

Partoprenis 97 germanaj membroj la 28an IFEF-kongreson en Skelleftea. La ĝisnuna IFEF-estraro estis komplete reelektita, ankaŭ do la gekolegoj Kruse kaj Gießner. En la Terminara kaj Fakprelega Komisionoj neniuj ŝanĝoj (Hartig, Brandenburg, Rösemann). Gvidanto de la nove starigita Historio-Komisiono fariĝis kol. Gießner (celo: eldoni broŝuron pri la historio de IFEF je ties 75a jubileo en 1984). Por la komisiono Varbado/Informado kol. Hartig gvidis apartan preparakunsidon en Skelleftea.

Kontaktoj, aranĝoj

La raportperiodo komenciĝas per la **19a jarkunveno en Treuchtlingen** (10. – 12. 10. 1975) kun 123 partoprenintoj (sabaton vespere 260). El 8 landoj estis gastoj. En Munkeno de la tiea direkcieja gazetara servo preparita gazetarkonferenco bedaŭrinde fiaskis pro neapero de ĵurnalisto. Dua konferenceto tia okazis vendredon en Treuchtlingen kun pozitiva eĥo en kelkaj regionaj gazetoj. Ankaŭ preparaj artikoloj jam antaŭe estis aperintaj. En multaj vendejoj pendis afiŝoj. La unuan fojon dum jarkunveno ni okazigis publikan informadon, kiu enhavis diaprelegon pri vojaĝo al Japanio, poste ĝeneralajn klarigojn pri la Internacia Lingvo kun provleciono. Rezulto estis kelkaj interesuloj. La cetera programo kiel kutime estis alloga kaj abunda.

GEFA-membroj ĉeestis en diversaj jarkunvenoj de aliaj landaj asocioj, ekzemple Belgio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Hungario, Nederlando, Svislando, krome en UK Athen, Internacia Skisemajno en Hispanio (La Molina), Feriosemajno Svisio. La prezidanto prelegis en Luzern (jubileo de la svisa asocio).

La kutimaj kontaktoj al BSW daŭris. S-ro Wolf, membro de BSW-ĉefestraro, partoprenis en Treuchtlingen. Laŭ peto de la ĉefestraro GEFA rezignis verki regularon pri si mem por BSW (aliaj kulturaj sekcioj havas tiajn regularojn). Por GEFA tio ne necesas laŭ opinio de BSW.

Krome diversintensa kunlaboro kun Germana Esperanto-Asocio, Germana Esperanto-Instituto kaj Internacia Esperanto-Muzeo Wien.

Ankaŭ la bonaj kontaktoj kun la tri sindikatoj daŭris, kiuj ĉiuj estas korporaciaj membroj de GEFA. La oficista GDBA eĉ plialtigis sian pojaran kotizon, GdED faris konsiderindan donacaĵon.

Informado

Nia komunikilo „Bulteno“ aperis kvinfoje. Spite al la pli akra financa situacio ni klopodis ne plimalaltigi la paĝonombro, ĉar la „Bulteno“ nepre necesas por konservi la kontakton inter la membroj kaj la asocio. La informblecoj pere de oficialaj fervojistaj revuoj limiĝis al la entreprena revuo „Wir“. Al ĝi liveritaj jam tre koncizaj artikoloj kutime estas ŝanĝreduktataj de la redakcio ĝis preskaŭ informna neefiko. Pro tio oni devas diri, ke el la antaŭaj eblecoj (Sozialblatt, Sozialzeitungen, BSW-Report) restas kvazaŭ nenio.

Por oficialaj komunikoj servas la respektivaj indikiloj de DB (Amtsblätter). Ankaŭ sindikataj revuoj regule raportas pri niaj aranĝoj. En tagaj gazetoj estas nombritaj 52 artikoloj pri nia agado. La rezolucio de Skelleftea aperis germanlingve en la „Bulteno“ kaj estas sendita al BSW kaj la prezidanto de FISAIC. Krome ĝi estas sendita al la ĉefadministracio de DB flanke de IFEF. Pere de la sekretario, ĝi estas disdonita al la tri sindikatoj kaj al la distriktkomisiitoj. GdED reagis per kontribuado en sia revuo, GDBA skribe subtenis la rezolucion. La migra ekspocio estas publike prezentita dum monatoj en Paderborn. Prizorgas ĝin nun kol. Brandenburg. Ĉe li

oni povas ĝin peti por prezentado. La kolegoj en München aranĝis efikan ekspozicion kaj aktive partoprenis en ekspozicio en Augsburg.

Junularo

Kvankam aperis kelkaj novaj vizaĝoj junaj, ĝis nun nenio raportinda. Tamen menciindas, ke la nova kaj moderna

internacia afiŝo de IFEF estas distribuita. Ĝi bone taŭgas kaj estu vaste utiligata.

Emerituloj

Denove ni aranĝis kunvenojn por la emerituloj en 1976, por la norda parto en Wuppertal (24. 7.), por la suda en Karlsruhe (4. 9.).

Gießner

Jahresbericht über den Zeitabschnitt von der 19. bis zur 20. Jahresversammlung

(Das Wichtigste aus dem Esperanto-Original)

Personelle Veränderungen:

Nachdem die Zahl der Direktionen von 16 auf 10 vermindert worden ist, hat auch der Bezirksbeauftragte für Regensburg sein Amt verloren. Sonst keine Änderungen.

Kurse:

In 1975 begannen 7 Sprachkurse für Anfänger (im vergangenen Jahr 8). Die **Prüfungskommission** prüfte in Treuchtlingen 4 Kandidaten mit Erfolg.

Mitarbeit in IFEF

97 Mitglieder nahmen am 28. IFEF-Kongreß in Skelleftea (Schweden) teil. Der bisherige IFEF-Vorstand wurde dort wiedergewählt (u. a. die GEFA-Mitglieder Kruse und Gießner als Sekretärin und Präsident). In den Ausschüssen für Fachwörter- bzw. Fachvortragsangelegenheiten sind wie bisher die Koll. Hartig, Brandenburg und Rösemann tätig. Zum Leiter des neu gebildeten Ausschusses für Verbandsgeschichte wurde Koll. Gießner gewählt.

Kontakte, Veranstaltungen

Das Berichtsjahr begann mit der 19. Jahresversammlung in Treuchtlingen (10. – 12. 10. 1975) mit 123 Teilnehmern (am Begrüßungsabend 260), darunter Gäste aus weiteren 8 Ländern. Das Echo in der Öffentlichkeit war zufriedenstellend. Herr Wolf, Mitglied des BSW-Hauptvorstandes, war bei der Jahresversammlung anwesend. GEFA-Mitglieder nahmen an Jahresversammlungen anderer Landesverbände teil, dgl. am Allgemeinen Weltkongreß in Athen, an der Ferienwoche in der Schweiz, an der Skiwoche

in den spanischen Pyrenäen u. a.

Wie immer arbeiteten wir mit dem Deutschen Esperanto-Bund, dem Deutschen Esperanto-Institut und dem Internationalen Esperanto-Museum in Wien zusammen.

Information

Das Mitteilungsblatt „Bulteno“ erschien fünfmal. Wir bemühen uns, es trotz der gespannten finanziellen Lage im gewohnten Umfang erscheinen zu lassen. Dazu soll die Anfang 1976 durchgeführte Beitragserhöhung von 6,- auf 9,- DM jährlich helfen.

Informationsmöglichkeiten beschränken sich fast nur auf die Unternehmenszeitschrift „Wir“. Selbst sehr kurz gefaßte Berichte werden jedoch von der Redaktion bis zur informativen Unwirksamkeit weiter gekürzt. Die Amtsblätter bleiben nur für offizielle Ankündigungen. Auch die Gewerkschaftszeitungen bringen Kurzberichte, dgl. „Die Bundesbahn“. In den Tageszeitungen wurden 52 Veröffentlichungen gezählt.

Die Kongreßresolution von Skelleftea erschien deutschsprachig im „Bulteno“. Sie wurde auch dem Hauptvorstand des BSW, der Hauptverwaltung der DB, den Gewerkschaften und der FISAIC zugeleitet. GdED und GDBA reagierten positiv. Die Wanderausstellung wurde mehrere Monate hindurch öffentlich in Paderborn gezeigt.

Senioren

1976 zwei Altentreffen, für den Norden in Wuppertal (24. 7.), für den Süden in Karlsruhe (4. 9.).

Gießner

Ekstrakto el la salutvortoj de la prezidanto en Paderborn

Nia jarkunveno estas la 20a en longa ĉeno da tiaj kunvenoj. Mi deziras

memorigi tiujn inter vi, kiuj ĉeestis 1957 dum nia unua modesta jarkunveno en Fulda, bv. kompari la evoluon ĝis hodiaŭ. Bv. imagi la centojn, ja milojn da horoj

necesaĵoj por ĉiujare realigi ĉiam denove tian manifestacion. Bv. imagi la altan nombron da neesperantistoj, da eminentaj gastoj, ĵurnalistoj, dubemuloj, kritikuloj, kiuj dum tiuj jaroj en multaj lokoj estis informitaj pri nia lingvo, estis konfrontitaj kun afero, kiun ili plej ofte malĝuste taksis en iu ajn formo. Kaj nelaste bv. konstati la progreson en la formo kaj enhavo de niaj jarkunvenoj dum tiuj 20 jaroj. Ĉu ne agrable, kontentige? Ĉu la bela programo, la ĉeestantaj eminentuloj, la ĉeesto de niaj eksterlandaj amikoj, ne povas kaŭzi al ni kontentigan senton pri tio, kion ni atingis? Jes — kaj ne. Permesu, ke mi donu paralelon per kelkaj miaj vortoj el Skelleftea. Tie mi diris, ke la kongreso estas brila, ke centoj da kongresanoj ne timis la longegan vojon, ke tiu manifestacio de nia federacio kiel kutime bone impresis. Sed tamen la situacio ne kontentigas. Mi bedaŭrinde devas konstati ke same en GEFA. Ne sufiĉas brilaj jarkunvenoj, kiam samtempe la membronombroj stagnas, ja kelkloke regresas. Ne sufiĉas viziti kongreson aŭ jarkunvenon kaj por si mem atendi, ke certe ĉion alian prizorgos la estraro kaj manpleno da bonvolemluloj. Se ni daŭrigos en tia maniero, ni povos antaŭvidi la tempon,

kiam nia germana asocio troviĝos inter la malgrandaj de IFEF, kvankam la nombro de germanaj fervojistoj estas inter la plej altaj de la eŭropaj fervojoj. Ja ekzistas esperigaj esceptoj, kaj la agado de malmultaj aktivuloj estas pruvilo, ke ankaŭ spite al la nuntempa katastrofa profesia ŝarĝo de la fervojistoj progresoj eblas.

Mi ankaŭ citu la bonegajn rezultojn ĉe niaj okcidentaj najbaroj, la francoj. Dum malmultaj jaroj ili preskaŭ duobligis sian membronombrojn kaj nun atingis 600. Ĉu miraklo? Tute ne. Sed estas la rezulto de intensaj, celtrafaj klopodoj de multaj helpantoj, ne nur de unuopuloj. De jaroj, karaj geamikoj, mi avertas. Kaj ĝuste pro tio, ke ni festas la 20an jarkunvenon, mi denove avertas. Pripensu en la grupoj, kion fari. Plej urĝe necesas vigligo de nia grupa loka vivo kaj la ĝenerala preteco kunlabori, kunhelpi. En kvin jaroj ne festos la 25a jubilean jarkunvenon. Gis tiam mi insiste deziras kaj petas, ke la situacio estos ŝanĝinta, ke denove la aktiveco de niaj membroj kreskis. Bv. ankaŭ en tiu senco studi la jarraporton en la venonta „Bulteno“. La venontaj jaroj estos decidaj! La decido estos ĉe la grupoj! Decidu bone! Ne estos alternativo!

Du renkontiĝoj kun niaj emerituloj



Wuppertal 24. 7. 1976

La 24an de Julio ni estis kune kun 20 el niaj membroj **en Wuppertal**. En apuda ĉambro de la stacia restoracio gaje babilanta rondo el la norda parto, inter ili s-ro Heintz el Berlin, sidis ĉe tablo por komuna tagmanĝo. Posta veturado per la 75 jaraĝa dentfervojo super la rivero Wupper estis por kelkaj inter ili unika travivaĵo.

En Karlsruhe kunvenis la 4an de Septembro 22 membroj el la suda parto. Vizito en la urba ĝardeno estis agrabla interrompo post la tagmanĝo. S-ino

Marg. Schmidt ĝojigis la ĉeestantojn per deklamo de „Sorĉlernanto“ de Goethe. La tempo tiom rapide kaj vigle forflugis, ke ne restis sufiĉe da tempo por babilado. Kafo kaj kuko en ambaŭ aranĝoj estis donitaj. Malavare la partoprenantoj kolektis por la Japana Fonduso 120,— GM. Ĉiuj partoprenantoj foriris kun la deziro, ke venontjare okazu simila aranĝo. Specialan dankon ili direktas ankaŭ ĉi-loke al la BSW-Cefestraro kaj al la du helpantoj kolg. Schindler el Schwelm kaj kolg. Hug el Karlsruhe. E. Kruse



Karlsruhe

4. 9. 1976

El la grupoj

München:

La fervojista Esperanto grupo Munkeno kazigis, kune kun la urba grupo, Esperanto-ekspozicion, de la 9a ĝis la 11a de Oktobro.

La 11an de Oktobro vespere estis informvespero kun provleciono kaj lumbild-prezentado, unue oni montris industriajn varbbildojn de Agfa-Gaevert kaj poste raportis s-ro Thalmeier pri siaj multaj vojaĝoj al ĉiuj mondpartoj.

Partoprenis tiun vesperon 54 personoj, la plej multaj estis neesperantistoj.

Post la salutoj de s-ro Weidacher interesige informis s-ro Reinhold Maier, (instruisto) pri Esperanto kaj samtempe prezentis provlecionon.

Dum la antaŭpreparo ni disdonis preskaŭ mil afiŝojn kaj forsendis pli ol 400 afiŝojn al urbaj bibliotekoj, popolatlernejaj filioj kaj al ĉiuj junularlibertempaj hejmoj.

Unuafoje provita kaj bonsukcese prezentita estis la informejo, apud la piediranta kvartalo, kie ni disdonis 2500 varbfoliojn pri Esperanto, atentigante pri nia ekspozicio.

La ekspozicion vizitis dum tri tagoj pli ol 300 personoj, kiuj preskaŭ ĉiuj petis pluajn klarigojn kaj informojn. Ĉiuj jesis kaj trovis nepre necesa la enkondukon de komuna lingvo en la unuigita Eŭropo. La plej multaj miris kaj ne sciis antaŭe, ke en Munkeno ekzistas Esperantogrupo. Evidentiĝis, ke estas ni, kiuj devas pli grandskale prezenti nin al la publiko, do

eliri el nia izoliteco.

Ke la ekspozicio okazis, ni dankas al Josef Weidacher, kiu ankaŭ faris la ĉefan laboron!

Frankfurt (M):

Änderung der Dienstanschrift des Bezirksbeauftragten: BAmtm Kiefer, BSA, 6000 Frankfurt (M), AA 920, Basa 955/6070

Der im Januar in Frankfurt (M) begonnene Esperanto-Kurs soll nun nach der Sommerpause fortgesetzt werden.

Teilnehmer dieses Kurses haben ihre Sprachkenntnisse schon beim IFEF-Kongreß in Skelleftea erprobt.

Im Herbst ist der Beginn eines neuen Kurses geplant, Interessenten können sich schon jetzt beim Bezirksbeauftragten melden, Ruf 955/6070.

Auf der Rückreise vom UEA-Kongreß in Athen machten verschiedene internationale Esperanto-Karawanen in Frankfurt (M) Station, so z. B. aus Korea, Polen, USA. Am Samstag, dem 14. 8. 1976 trafen wir uns mit den Teilnehmern, unter denen sich ca. 20 Japaner befanden, im Restaurant „Rhodos“, in froher Runde. Der Abend bot aufschlußreichen Gedankenaustausch und angeregte Unterhaltung. Nächstes Reiseziel der Freunde aus dem Fernen Osten war Paris.

Die Gruppe „Esperanto Informa Servo Offenbach e.V.“ veranstaltete in Zusammenarbeit mit den Sprachfreunden aus Frankfurt (M) und Darmstadt in der Volkshochschule Offenbach eine Podiumsdiskussion mit den politischen Parteien über das Sprachproblem. An dem lebhaften Meinungsaustausch beteiligten sich auch Mitglieder unserer Vereinigung.

Die Parteien zeigten sich nur lückenhaft informiert, standen dem Problem jedoch aufgeschlossen gegenüber.

Die Tagung fand ein positives Echo in der Presse.

Novajoj el la Balkano — Kompletigo

(Temas pri artikoleto kaj rimarko sur la paĝo 8 de la Bulteno Nr. 3/1976)

La nova fervoja linio Beograd — Bar estas longa 476 km kaj tute nu tuŝas la urbon de Sarajevo. La linio kondukas de Beograd al Valjevo — Požega — Titovo Užice — Priboj na Limu — Titograd kaj Bar. En la stacio Požega oni realigos ĝis la fino de ĉi tiu jaro la ligan kun la stacio Čačak, tio estas kun la linio Beograd — Kraljevo — Skopje, kaj per tio

oni faciligos la transportojn el orienta kaj suda Serbio respektive el Makedonio (eventuale el Rumanio kaj Bulgario ankaŭ). La tuta linio Beograd — Bar estos elektrizita (ĝis nun nur la parto Beograd — Titovo Užice) kaj pasas tra multaj tuneloj (25% de la longeco) kaj tra multaj pontoj, el kiuj speciale menciinda estas la ponto super Mala Rijeka, la plej alta fervoja ponto nuntempe en Eŭropo.

Eventuala kunligo de jugoslavijaj kaj albanaj fervojoj estas studata, sed ankoraŭ ne decidita. Ekzistas du eblecoj: ligo al Bar (aŭ eventuale Titograd) aŭ ligo kun fervojoj en Makedonio (linio Skopje — Gostivar — Kičevo).

La problemoj estas ĉiukaze tre grandaj kaj la dato de realigo de tiuj projektoj ankoraŭ ne estas certa.

Gvozden Sredić



Informa babilado

Dekstre prof. d-ro Helmar Frank, kiu ebligis interesan viziton en FEoLL, Centro por Esploro kaj Evoluo de Instru-kaj lernmetodoj. Prof Frank ankaŭ sin okupas pri la preparado de la Internacia Lingvo por la kibernetiko.

Lingva angulo N-ro 8

El la regularo Esperanta

Jen la dek-kvina kaj dek-sesa el la
16 REGULOJ:

(15) La tiel nomataj „vortoj fremdaj“, t. e. tiuj, kiujn la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo Esperanto sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo; sed ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la fundamentan kaj ceterajn formoj el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto.

(16) La finaj vokaloj de la substantivoj kaj de la artikolo povas esti forlasataj kaj anstataŭataj de apostrofo.

Fügen Sie folgende Satzpaare zusammen:

Benutzen Sie dafür: **kiu; kiuj; kiun; kiujn**
Beispiel:

Esperanto estas internacia lingvo. —
L. L. Zamenhof publikigis ĝin en 1887.
Esperanto estas internacia lingvo, kiun
L. L. Zamenhof publikigis en 1887.

Konversacia Kurso

La verkoj aperintaj lastatempe por stimuli lingvajn komencantojn sur ilia vojo al la kategorio de progresantoj kaj — se iel eble — al tiu de perfektuloj estas pliriĝigitaj per Konversacia Kurso. GEFA-ano Hartig transprenis la esperantlingvan eldonon de tiu origine anglalingva verko. La kurso estas rekomendinda por pluraj lernantoj, sed ĝi taŭgas ankaŭ por unuopuloj. Ĉiu sekcio de la kurso konsistas el tri partoj. La unua prezentas la materialon, la dua konsistas el aranĝitaj dialogoj, kaj la tria enhavas nur demandojn. La temoj estas prenitaj el la ĉiutaga vivo; ili ne koncernas Esperanton aŭ la fervojon, pro kio la kurso taŭgas por ĉiuspeca komencanto. Se oni studas kaj laboras laŭ la lecionoj, la dezirita sukceso ne forestos. Iom mirigas, kial la tradukinto uzas troe interligajn strekojn ĉe kunmetitaj vortoj. Neniu gramatika regulo postulas tion. Plurfoje mankas la akuzativo (Kiel lasta leciono ni havas la anglan). Oni ne „servas“ la matenmanĝon, sed „alportas“ ĝin. „Plej“ kaj „pli“ bezonas kiel mem-

1. Bileto estas folieto el kartono. — La vojaĝanto ricevas ĝin ĉe la ĝiĉeto.
2. Lokomotivoj estas maŝinoj. — Ili servas por translokado de vagonoj.
3. Relo estas longa stango. — Ĝi servas duope kiel vojo kaj rulgvidilo por vagonaroj.
4. Signaliloj estas instalaĵoj. — Oni vidas ilin laŭlonge de la relvojoj.
5. Remizo estas tegmentita loko. — Oni uzas ĝin por ripari kaj trakti lokomotivojn.
6. Stacio estas konstruaĵo. — La pasaĝer-trajnoj haltas en ĝi.
7. Bariero estas levebla trabo. — Ĝi povas bari vojon.
8. Bremsoj estas meĥanikaj aŭ elektraj aparatoj. — Oni uzas ilin por haltigi la moviĝon de veturiloj.
9. Trajno estas aro da vagonoj. — Ili sekvas unu la alian, kunkroĉitaj kaj tirataj de lokomotivo.
10. Konduktoro estas oficisto. — Li akompanas pasaĝertrajnon.

Hartig

staraj adverboj la finaĵon „e“. Abverbiaj tempoj, ekz. vespere, esprimas la sinsekvon de pluraj vesperoj. Parolante pri unu sola vespero oni uzas „la vesperon“. Aĉetitaj varoj estas portataj en „sako“, ne en „poŝo“. Se oni iras dimanĉon **al** la preĝejo, stariĝas la demando, kial sabaton oni iras **en** la restoracion aŭ magazenon.

Malgraŭ tiuj ne tro gravaj eraroj la broŝuro estas valora helpo kaj meritas esti multflanke uzata. Ĝi estas havebla pere de s-ro Schrapp, SV Nord Gruppe BVA, 4400 Münster (Westf); Basa 945/1771.

W. B.

Fervoja Terminareto

Restas stoko je via dispono. Vi nepre bezonas ĝin por bone kompreni fakajn artikolojn kaj alkitimiĝi al la fervojista lingvo. Krome ĝi estas bonvena donacaĵo. Ne forgesu aĉeti la terminareton germana-esperanta kaj esperanta-germana. La reduktita prezo: 5,— GM, ricevebla ĉe G. Ritterspach, AA 5005, ZVL Frankfurt (M), Basa 955/3680, Poŝtadreso: Berliner Allee 1, 6070 Langen.

Nova fervoja linio en Afriko

La plej granda prestiĝentrepreno de Pekino en Afriko, la 1850 kilometroj longa fervojlinio inter Tanzanio kaj Zambio, estis antaŭnelonge oficiale transdonita fare de la Ĉinoj al la du afrikanaj najbaraj ŝtatoj. Tiu t. n. „granda UHURU-fervojo“ estas tre grava; ĝi ebligas ĉefe la transportadon de kuproerco el la zambiaj minejoj rekte al la tanzania transmara haveno Dar-es-salamo, kaj akcelas la eksteran komercon de la zambia ĉefurbo Lusako. Finkonstruis tiun fervojon 15 000 ĉinoj kaj 35 000 afrikanoj en rekorda tempo de kvin jaroj.

Tradukis B u s s e

IFEF-skisemajno 1977

„La urbeto Les Gets (prononcu: le ĵe), kie okazos la skisemajno 1977 ne estas unu el tiuj mondfamaj skieurboj kiuj alportas devizojn al siaj landoj, sed ĝi estas ege agrabla, sufiĉe facile atingebla kaj proponas prezojn por ĉies povo. La restado okazos en sufiĉe komforta domo, kiu nomiĝas Le Montana. Tie vi ricevos abundajn manĝojn kaj ĝuos agrablajn festvesperojn. Komprenoble skiado estas ebla por ĉies kapabloj kaj belaj ekskursoj meritas vian atenton. Ekzistas diversaj eblecoj por atingi Les Gets. La stacidomo CLUSES (25 km) troviĝas sur linio al St Gervais (tabelo 533 de la franca horarlibro). Laŭ la situo de via hejmurbo en Germanio, vi povas elekti inter tiuj jenaj rimedoj.

| | | |
|--|------------|-------------|
| Paris — Lyon | 23.46 | |
| (en tiu trajno, rezervado estas rekomendita) | | |
| Cluses | 8.00 | |
| Les Gets | 9.10 | |
| | Strasbourg | 20.23 |
| | Cluses | 6.06 |
| | Les Gets | 7.05 |
| | Genève | 11.05 |
| | Aix | 12.12/12.30 |
| | Cluses | 14.05 |
| | Les Gets | 17.40 |
| | Genève | 13.00 |
| | Culoz | 13.52/14.14 |
| | Cluses | 16.40 |
| | Les Gets | 17.40 |

Informoj kaj aliĝoj: Gerard HORN
16 rue Denis Papin
F 93250 VILLEMOMBLE



Dum la Kristfestaj tagoj en la ĉefstacidomo Frankfurt/Main

(foto DB-presdienst)

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

Germana Esperanto Fervojista Asocio

Adresŝanĝo

Vicprezidanto / Redaktoro:

BAmtm Graß, BD Köln — F-Büro, F 12 —
Basa 943 / 1641

Redaktfino por n-ro 1/77 estas la 15. 1. 77

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main), Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 5650 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz.